# nia voĉo

**madrida esperanto-liceo oktobro 2025**


## BALDAŬ ĈEESTA KURSO DE ESPERANTO EN NIA SIDEJO

GRANDA NOVAĴO: En tiu ĉi monato oktobro komenciĝos nova ĉeesta kurso de Esperanto en Madrido por komencantoj. Ekde la 21a de oktobro 2025 ĝis februaro 2026, ĉiujn mardojn ekde la 18,30 h. en la sidejo de Madrida Esperanto-Liceo, str. Rodríguez San Pedro, 13 (metrostacio San Bernardo aŭ Argüelles). Enskribiĝu ĉe: http://mallonge.net/cursoeomadrid

La instruisto estos la nova ano Javier Vílchez. Li prelegos la 9an de oktobro en la Centro Cultural Galileo (str. Fernando el Católico, 35) je la 19a horo, pri Esperanto, kaj por prezenti la kurson.

Informu viajn amikojn kaj ĉiujn kiuj povas esti interesitaj. Vi povas uzi la apudajn afiŝojn por diskonigo. Petu ilin al Liceo se vi volas ilin utiligi.







## DENOVE PRI LA KURSO EN UNED

Memoru ke en septembro malfermiĝis la enskribiĝo al la nova eldono de la kurso de Esperanto en la Nacia Universitato por Neĉeesta Edukado (Universidad Nacional de Educación a Distancia, UNED), ne nur en la du kutimaj niveloj A2 kaj B1, sed, kiel grava novaĵo, ankaŭ en nivelo B2. Oni povas aliĝi ĝis la 22a de oktobro, kaj memoru ke anoj de Hispana Esperanto-Federacio ĝuas grandan rabaton, kiel kunlaboranta asocio.

Vidu ĉiujn informojn ĉe: https://www.uned.es/universidad/inicio/estudios/idiomas.html. Krome, artikolo pri la kursoj ĵus aperis en la reta gazeto Libera Folio: https://www.liberafolio.org/2025/09/30/unikaj-retaj-kursoj-sur-universitata-nivelo/.

## NOVAĴO PRI LA VENONTA HISPANA KONGRESO

Memoru ke, kiel oni anoncis dum la kongreso de Sorio, la venonta 84a hispana kongreso de Esperanto okazos en la urbo Portugalete, tre proksima al Bilbao, de la 14a ĝis la 18a de julio 2026. Jam estis muntita la retejo, ĉe: https://kongreso.esperanto.es/, kie oni jam povas konsulti la unuajn informojn, kiujn oni kompletigos dum la venontaj semajnoj.

# nia voĉo oktobro 2025

Jam eblas aliĝi, kaj fakte jam 20 homoj tion faris ĝis nun. Oni krome anoncis ke la 50 unuaj aliĝintoj al la 84a Hispana Kongreso de Esperanto ricevos donace la kanton “Amikoj” de la afrika kantisto Chris Freddy. La kanto aperos en bitalbumo publikigota de Vinilkosmo ĉi-aŭtune. Kaj tuj kiam ĝi estos surmerkatigita, ĉiuj 50 unuaj aliĝintoj ricevos ligilon por elŝuti la kanton “Amikoj” por ĝui ĝin premiere, kaj konservi ĝin por sia propra plezuro.

## PREZENTADO DE TRILINGVA POEMARO

La 19-an de septembro oni prezentis trilingvan poemaron, hispana/ esperanta/portugala, en la publika biblioteko “Marcos Ana” de San Sebastián de los Reyes. Temas pri “Poesía luz me urge / poezio lumo al mi urĝas / urge-me poesia luz”, de Armando Silles, kun ĉeesto interalie de la aŭtoro kaj de la tradukinto al Esperanto, Miguel Fernández.




Temas fakte pri la dua prezentado, ĉar ĉeestintoj al la hispana kongreso en Sorio eble memoras ke tie okazis jam la unua diskonigo de la libro.

Pri la evento raportis la loka televido Canal Norte Digital. Vi povas spekti ĝin en: https://www.youtube.com/watch?v=sofNgHUOorU.

## PROGRAMITAJ RENKONTIĜOJ



La unuasabata kunveno okazos la 4-an de oktobro, je la 18:30, ĉe la polpejo Pulpería O Miño, en la strato Idioma Esperanto, 2. Memoru ke ĝi estas malferma al iu ajn, sendepende de la lingva nivelo kaj ke la babilado estas libera, sen programo. Kiel vi povas vidi en apuda foto, la lasta renkonto estis tre sukcesa, kun dek kvin ĉeestantoj, interalie iuj komencantoj aŭ novuloj.

Memoru ankaŭ ke la sidejo malfermiĝas ĉiulunde, post la 18,30, kiel tradicie. Ni organizas babiladojn, kaj foje teatrajn prezentadojn kaj aliajn aktivadojn.

## PLIAJ LOKOJ POR INFORMIĜI

Por novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En Fejsbuko vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. Vi povas trovi nin ankaŭ en la socia reto *Bluesky*, en la adreso: https://madridaliceo.bsky.social.

Ankaŭ eblas aliĝi al la ŭacapa grupo, por la madridaj esperantistoj, per la ligilo https://chat.whatsapp.com/C7XLCX9tNt28M50g3qxH1g

Por informiĝi pri tutmondaj renkontiĝoj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com